# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**

**PLENUMITA 24/11/2022 Sescentdeka eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**

Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ http://thesaker.is/

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 684,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **300,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **152,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **140,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018

Nun studas **92,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )



## Esperanta Retradio



Donas bonan ĉirkaŭ-5 minutan aŭskultadon kaj legadon ĉiun tagon

**Kiel genoj influas la muzikecon de homo**

21-A DE NOVEMBRO 2022

## Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.** Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Vi respondecas pri via sano, do portu maskojn. *Roger Springer*

# Dorothy May ENDERBY 10.9.1929 - 26.10.2022

Dediĉita edzino de Keppel (kiu mortis en 2015), amata amikino kaj kamarado de multaj, Dorothy ege mankos al amikoj kaj familianoj.

Dot renkontis Kep en Kanbero en 1960. Ŝi estis bibliotekistino ĉe Chifley. Ili edziĝis en 1964. Ili havas du infanojn Keir (filon) kaj Jo (filinon).
Pro familio kaj subtenado de la politika kariero de Kep, Dot rezignis kiel bibliotekistino en 1975.







En 1974 komputila epoko alvenis al la Biblioteko *Chifley.* Dorothy Enderby, servisto de legantoj.

Dot kaj Kep tre ĝuis sian tempon en Balmain, velŝipante en sidneja haveno, flugante aviadiletojn, kaj lernante Esperanton – la internacian helplingvon.
Ripozu pace Dot.



*Terry manley*

## Du maljunaj Viroj

Kara Roger!

Ni vivas en tre stranga mondo, ĉu ne? Antaŭ iom da tempo, eble antaŭ unu horo, vi sendis al mi la plej novan numeron de "Aŭstraliaj Esperantistoj", kaj longan tempon poste, mi decidis tralegi ĝin. Sed, ĉu vi povas diveni, kion mi trovis? Jes, vi pravas! Mi trovis nenion!

Mi ne estas inĝeniero kaj tial ne, fakte tute ne, komprenas kiel funkcias konfuziloj. Mi do skribis al mia bofilo kaj klarigis al li la problemon, sed ĝis nun mi ricevis neniun respondon de li. Mi bone scias, ke li povas sidi kviete en sia hejmo kaj trarigardi mian konfuzilon, kaj iom poste trovi tion, kion vi sendis al mi.Tiam li povos sendi ĝin al mi. Kaj mi povos tralegi ĝin kaj skribi kelkajn dankesprimojn al vi, ĉu ne? Sed nenio el tio jam okazis. Ŝajnas ke mia konfuzilo malsanas, mi supozas! Tony, mia bofilo, devus veni kaj sanigi la malsanan konfuzilon, ĉu ne?

Sed, same kiel vi, ankaŭ mi ja sentas min maljuna, kaj ofte tute ne sentas min kapabla sidi antaŭ la ekrano kaj provi ŝajnigi min tre lerta esperantisto.

Tial mi petas vian pardonon! Ni ambaŭ ne plu apartenas al la infana raso, aŭ ĉu?



Multajn el la plej bonaj salutoj kaj bondeziroj al vi de unu el viaj plej bonaj amikoj, *Bob Felby*

# Bukedo kaj Brikbato!





La foto en AE-609 de la lageto-reflekto, sendita de Peter Danzer, estas absolute paradize belega. Dankon kaj gratulojn, Petro!

Sed al la foto de la gebeluloj en Adelajdo mankas nomoj. Mi rekonis nur duonon. Karaj kontribuantoj, bonvolu ĉiam aldoni nomojn kun viaj portretoj, ĉar tiuj el ni kiuj ne vizitas aliajn ŝtatojn tamen ŝatus scii kiu estas kiu en ĉiuj AE-fotoj. Eĉ nia kara eldonisto, Roger, ne povas komplezi, se vi ne informas lin, ĉiufoje.




Antaŭdankojn, en espero.......................................*Vera Payne*







Lasta babilado ĉe la hejmo de komencantino Pam kaj fratino *Petro Danzer*



# Tagmanĝo kun Martina kaj Hanno, du esperantistoj el Germanio.



*Sandor Horvath*

Martina, Trevor, Hanno, Sandor, Paul, Helen



**3ZZZ** . La 21an de novembro 2022 Helen kaj Sandor pro tio ke ili estis en Melburno ĉeestis la elsendon en 3ZZZ.



Se vi volas scii kial ili estis en Melburno tiam aŭskultu la elsendon je

www.3ZZZ.com.au
aŭ
www.esperanto.com.au



*Franciska Toubale*

# NUNA MILITO en la urbo Goma Respubliko Demokratia Kongo:

Saluton gesamideanoj,

Dum ni ANF-anoj volus revoki vin petante pri la monhelpo , bezonata ekde nun ĝis fino de decembro por la pagoj de la lernejaj kotizoj por niaj subtenataj infanoj por la unua trimestro , jen kun bedaŭro mi raportas al vi pri la trapasanta aĉa periodo pro la NUNA MILITO en la urbo Goma Respubliko Demokratia Kongo:



Goma estas nun ĉirkaŭata , ĉar ĉiuj vilaĝoj estas prenitaj de la ribeloj. Tio kaŭzas amason da rifuĝintoj, malsaton, altiĝon de la prezoj por nutraĵoj, (ĉar ili ja venas el la okupitaj vilaĝoj, do la vojo estas barita). Ni ne scias kio okazos en Goma dum la sekvaj tagoj. Ni scias ke la tuta mondo zorgas kaj interesiĝas pri la milito en Ukrainio, sed pri Goma oni verŝajne nenie raportas.




Nuntempe ni estas petantaj al vi (laŭ la ebleco de ĉiu) monhelpon por ke ni aĉetu manĝaĵojn kaj disdonu al niaj prizorgataj georfoj.

Koregan dankon al vi ĉiuj, kaj por mondonaci kaj por pludoni la informojn al aliaj ĉio helpos! Mi alkroĉas fotojn de la rifuĝintoj .

Ni estas kontakteblaj ĉe : orfojkongo@gmail.com

Por ANF Augustin el Goma ''. *Augustin KAKOZWA*





# Skribu pri via klubo



# La politiko de la mondo ŝanĝiĝas

*Roger Springer*

http://thesaker.is https://www.greanvillepost.com/
http://www.globaltimes.cn/index.html https://sputniknews.com/
Mi ne enmetas ligojn el la kapitalista mondo ĉar la ĉiutaga medio bone informas vin pri tio.

## *HIPOKRITECO EN RELIGIO - KIAL?*

Tute nova dulingva eseo de
*pauljdesailly@gmail.com*
**https://www.bandeeducation.com/hypocrisy-in-religion**

Samtempe Alfredo Cabada kiu estas la Community Manager de la Innovation Factory en la urbocentro de la ĉefurbo de Sudaŭstralio (60 Halifax St. Adelaide) oficiale re-malfermas mian nov-farejon en kiu mi vendas miajn retajn librojn kaj donas **senpagajn Esperanto-klasojn**. Mia cel-grupo precipe estas la junaj generacioj, kiel en la mur-afiŝo de D-ro Zamenhof en junaĝo kiam li unue prezentis la internacian help-lingvon de mondpaco al universitataj amikoj. Vidu paĝon du de AE:
https://esperanto.org.au/ftp-uploads/AE-602.pdf *Paul Desailly*

